

International Terminology Summer School 2012 – Internacia Somera Terminologia Trejnado en Vieno

Olof Pettersson, Svedio (olpe@esperanto.se)

Mi havis la plezuron esti elektita por ricevi stipendion de UEA kaj partopreni en semajna kurso pri terminologia laboro, kunaranĝita de *TermNet* kaj *Zentrum für Translationswissenschaft* (la Centro pri Tradukadoscienco) ĉe *Universität Wien*, universitato en Vieno, Aŭstrio.



La enirejo de la Centro pri Tradukadoscienco.

Ĝenerale pri la kurso

La kurso celas kaj komencantojn, kaj pli spertajn tradukistojn, lingvistojn aŭ eĉ terminologiistojn kiuj volas pliprofundigi siajn sciojn pri terminologio. Memstare la kurso verŝajne ne sufiĉas por iĝi sperta terminologiisto el nenio, tamen ĝi traktas multajn temrilatajn aferojn de terminologia laboro, kaj kovras laŭ la instruistoj ĉion bezonatan por poste (septembre) fari oficialan teston (rete) kaj ricevi atestilon agnoskitan en la Eŭropa Unuiĝo. Por la testo oni tamen devas pagi mem, ĝi ne estas parto de la kurso. Ne ekzistis testo aŭ ekzameno fine de la kurso: oni simple ricevas atestilon, kiu indikas ke oni partoprenis. Se oni estas studento je magistra aŭ doktoriĝanta nivelo kaj studas ekzemple tradukadon aŭ lingvistikon, oni povas ricevi 6 ECTS-poentojn (*European Credit Transfer System*, komuna poent-sistemo por universitataj studoj en Eŭropo). Tamen por tio oni devas verki seminarian tezon rilate al la kurso, ekvivalentan al semajno da studado, kiun la universitato poste aprobu kaj pritaksu.



La kursĉambro en la universitato.

La partoprenantoj kaj enhavo de la kurso

La kurson partoprenis ĉi-foje proksimume 60 personoj el 26 landoj, plejparte el Eŭropo, sed kelkaj venis el Argentino, Brazilo, Ĉinio, Kanado, Omano, Usono, Sud-Koreio kaj Saud-Arabio. Multaj el la partoprenintoj jam laboras kiel tradukistoj aŭ terminologistoj, kaj kelkaj – kiel mi – estas studentoj de lingvistiko, tradukado aŭ terminologio.

Oni ne nepre devas havi lingvistikan aŭ alian lingvorilatan edukadon aŭ antaŭscion por partopreni, sed kompreneble gravas havi intereson pri la fako. La uzata lingvo dum la kurso estis la angla, do bona rego (almenaŭ kompreno) de la angla estas grava. Kelkaj semajnoj antaŭ la kurso komenciĝis, ni

ricevis liston de rekomenditaj legaĵoj: artikoloj haveblaj rete, blogoj kaj retpaĝoj kun informo pri terminologio kaj enkonduko al ĝi.

La enhavo de la prelegoj dum la unua (kaj parte la dua) tago de la kurso, t.e. la bazo kaj la enkonduko al la fako, estis sufiĉe bone kovrita en la libreto *Terminologia gvidilo* de Heidi Suonuuti, tradukita al Esperanto el la angla (*Guide to terminology*) kaj eldonita de UEA. Mi rekomendus ĝin al ĉiuj kiuj volas mallongan enkondukon al terminologio. La aliaj prelegoj dum la kurso temis pri kaj teoriaj kaj praktikaj aferoj rilate al la temo: kiel inventi kaj decidi pri terminoj, kiel uzi la reton por trovi kaj elekti eblajn terminojn kaj difinojn, kiel krei modelon por datumbazo, k.t.p., sed ankaŭ iom pri projekta laboro kaj laborfluo, gravaj uzataj ISO-normoj (*International Organization for Standardization*) kaj juraj konsideroj, i.a. kopirajto kiam oni uzas tekstojn, difinojn kaj terminojn de aliaj.

La plejparto de la lasta tago kaj posttagmezo de la antaŭlasta tago temis pri prezentadoj de organizoj kaj terminologiaj projektoj de la partoprenantoj. Prezenti proprajn projektojn estis libervola afero (tamen deviga – parto de la testo – por tiuj



La kursmaterialo kaj atestilo de partoprenado.



Klaus-Dirk Schmitz, unu el la ĉefaj instruistoj de la kurso.

kiuj volas la formalan atestilon) sed oportuno prezenti sian organizon kaj rakonti pri la terminologia laboro tie, kaj ankaŭ ricevi reagojn, komentojn kaj proponojn de la aliaj kiel plulabori en la projekto. Ĉar mi – almenaŭ ĝis nun – ne sufiĉe bone konas la internan organizadon de UEA kaj ne kunlaboris en la nunaj terminologiaj projektoj, mi elektis ne fari prezentadon. Kiel komencanto, estis tamen sufiĉe interese aŭdi kaj vidi kiel terminologiaj laboroj estas faritaj en diversaj organizoj.

Praktikaj detaloj

La stipendio inkluzivis kostojn por la vojaĝo al Vieno kaj reen (ĝis maksimume 250 eŭroj), kotizon por la kurso, loĝadon ĉe la gastejo "Kaiser 23" kaj bileton por publika transporto (aŭtobuso, metroo, tramo) dum la tuta semajno. La stacio *Westbahnhof* ("Okcidenta trajnstacio") situas nur kelkajn piedirantajn minutojn for de la gastejo sur *Kaiserstraße 23*, kaj tie haltas kaj la flughavena aŭtobuso kaj la metroa linio rekte al la universitato. Matenmanĝo – laŭ mi bonega, eĉ luksa bufedo – estis inkluzivita en la prezo de la gasteja ĉambro, do mi dum la restado pagis mem nur por tagmanĝo kaj vespermanĝo.


Tagmanĝon dum la kurso ni ĝuis kune – grupe – ĉe diversaj restoracioj proksime de la universitato. Estus kompreneble permesita aĉeti kaj kunporti propran manĝon el vendejo por ŝpari monon, tamen troveblis sufiĉe multajn restoraciojn kun diversaj specoj de manĝaĵoj, kaj variaj prezniveletoj: mi pagis inter 5 kaj 10 eŭroj por tagmanĝo en la restoracioj. Plej grave, la tagmanĝa paŭzo ofertis oportunecon interparoli kaj ekkoni la aliajn partoprenantojn, kaj diskuti terminologiorilatajn aferojn. Krom paŭzo por tagmanĝo – kiu daŭris proksimume horon kaj duonon – estis ankaŭ du kafopaŭzoj ĉiutage: antaŭtagmeze kafo, teo aŭ suko kaj freŝaj fruktoj, posttagmeze kafo, teo aŭ suko kaj granda selekto da kukaĵoj – kaj ankaŭ fruktoj. Ankaŭ la kafopaŭzoj donis eblon interparoli kaj diskuti.

Ne nur prelegoj – ankaŭ kunestado

La unua vespero estis interkona vespero, kiam ni ĉiuj estis regalitaj per granda bufedo kun antaŭplado, ĉefplado kaj deserto, vino kaj loke farita biero el barelo. Ankaŭ estis ofertitaj bongustaj senalkoholaj trinkaĵoj – inter alie senalkohola pomcidro. Ĉiuvespere post la lasta prelego, je la kvina, la instruistoj invitis ĉiujn al *Stammtisch* – "la regula tablo" – en proksima restoracio (fakte la sama kie estis la interkona vespero) por socia kunestado kaj interparolado. Ĉiumatene (ankaŭ libervole) komencante je la naŭa, oni povis partopreni "terminologian matenmanĝon". Spite al la nomo, tio ne temis pri manĝado aŭ eĉ kafotrinkado, sed "intelekta matenmanĝo" en formo de eksterkurso prelego aŭ montrado de komerca programo por termina mastrumado. La ordinara prelegoj ekkomenciĝis je la deka.

Finaj vortoj

Entute mi ege ĝuis la kurson kaj estas tre dankema pro la ŝanco partopreni ĝin, kaj pasigi someran semajnon en Vieno! Eble la kurso estus eĉ pli fruktodona se mi havus pli da spertoj de praktika terminologia laboro, kiel ŝajne la plejmulto de la aliaj partoprenantoj, ne nur teoriajn antaŭsciojn kiel mi. Oni certe per propra studado kaj legado de la rekomenditaj artikoloj, blogoj k.t.p. povus lerni multe el tio kio estis kovrita dum la prelegoj, tamen laŭ mi la ĉefa valoro de la kurso troviĝas en renkonti kaj interkoni aliajn kiuj laboras kaj instruas en la fako, aŭdi kaj scii pri diversaj praktikaj labormanieroj, pri ofte uzataj programoj kaj tiel plu. Tamen – precipe por homoj kiel mi, kiu neniam uzis la programojn – mi dezirus kelkajn individuajn praktikajn ekzercojn, aŭ almenaŭ la eblecon iom provi la programojn mem: ne nur rigardi la instruiston montri, projekciita sur ekrano, ekzemple kiel aldoni terminon en datumbazon. Sed tiaj detaloj eble ŝanĝiĝos ĝis la venonta jaro.



La fama terminologiisto kaj esperantisto Eugen Wüster el Aŭstrio en la Esperanto-muzeo — eta vidindaĵo en Vieno.